

NORMANDA ESPERANTO BULTENO



ESPERANTO - NORMANDIE

Redaktas : Pierre Lemarchand, 2 résidence les Terres Quemines 76113 Hautot-sur-Seine.
Tel. 02 35 34 28 78 LEMARCHANDPI@wanadoo.fr

Abon-kotizoj : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie. C.C.P. 283.40.H Rouen.
La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la enhavo de la artikoloj kaj opinioj de la unuopaj aŭtoroj.

TAĜIKIO

Ni organizis, nome de Esperanto France, prelegvojaĝon por Svetlana kaj Firdaŭs ŜUKUROV el Taĝikio. Ilin akceptis kluboj en Thionville, Bourg-en-Bresse, Lyon, Paris, Angers, Saint-Brieuc, Hérrouville kaj Amiens.

Svetlana laboris kiel arkeologo en Scienca Instituto en Duŝanbe, ĉefurbo de Taĝikio. Firdaŭs instruis matematikon kaj ankaŭ estis montara ĉiĉerono. Nun li instruas esperanton en gimnazio. Pro iliaj fakoj ni ne povus antaŭvidi pli taŭgajn prelegantojn por prezenti tiun foran, por ni ekzotikan, landon !

Laŭ la raportoj jam ricevita la konferencoj plene sukcesis en ĉiuj urboj. Tre diskreta en la internacia koncerto, Taĝikio tamen meritas atenton. Ĝi estas vizitinda pro siaj altaj kaj multnombraj montoj sed ankaŭ pro sia longa kaj riĉa historio kun influoj lingvaj, religiaj, civilaciaj tre diversaj. Post la falo de Sovetunio, Taĝikio travivis ege kruelan civilan militon kun multaj viktimoj kaj granda parto de tiuj kiuj ne estis taĝike devenaj forfuĝis al Rusio, Israelo kaj aliaj pli riĉaj landoj. Nun mankas elitoj kaj rimedoj. Taĝikio havas nestabilajn aŭ potencajn najbarojn (Afganio, Pakistano, Ĉinio) kaj ofte malsekuras la rilatoj kun Uzbekio kie vivas granda taĝika minoritato.

En Hérrouville, la konferenco okazis en la rusa. Ĝin ĉeestis proksimume 35 homoj. Firdaŭs kaj Svetlana prezentis interesajn lumbildojn kaj precize kaj spontane respondis al tre multaj demandoj ĉefe pri la nuna situacio en Taĝikio. Ili konkludis per taĝika kanteto tute ĉarma. Aperis en la loka paĝo de Ouest-France.


Tiu dutaga programo estis plenplena. La 24a de marto, ili vizitis Monton Sankta Mikaelo kun tri amikoj el Sankta Brieuc, Christian Lévesque kaj Annick Besneville (Sud-Manche) kaj Yves Nicolas, Calvados. Christian tre bone preparis la viziton per informplenaj slipoj. Li ankaŭ donacis libreton en esperanto pri la Monto.

La 25an matene, ni rendevuis en la kastelo de Caen por urbocentra vizito. La afero tre plaĉis al Svetlana, kiel arkeologo. Partoprenis la viziton Jean-Pierre Sauvage, Brigitte Cottin kaj Yves. Henri Rousseau trovis ankaŭ kelkajn minutojn por ilin saluti. Posttagmeze, ili ripozis ĉe la marbordo kun Nicole Jehenne-Ledran kaj Anne Lesieur.

Dorlotis ilin en sia hejmo Yvette kaj Jean Le Breton.

Ĉiuj jam cititaj ĉeestis la prelegon ĉe Salono Puŝkin kaj ankaŭ Véronique Bessin, Patrick Etienne, Françoise Marie, Dominique Vanier, Claude Ferrand, Michèle Langeois, Damien Roetsblomme, Thierry Lelogeais. Ili ankaŭ ricevis saluton de Marie-Noëlle Harang.

Yves NICOLAS



Cotisation

2014

Une croix rouge dans cette case indique que vous n'êtes pas à jour de votre cotisation 2014. Merci d'envoyer votre règlement (8 Euros à l'ordre d'« Esperanto - Normandie ») à l'adresse indiquée ci-dessus. Merci pour votre soutien !

En tiu numero :

L'esperanto au Bac	2
Madagaskaro 1958	2 - 3
Flers, Granville, Coutances, Kubano :	3
Hérrouville 30 jaroj	4
Brest - Vladivostoko Stella plage 2013	5
La tri hakiloj	6

L'espéranto au bac



Espéranto-France et Sat-Amikaro ont remis vendredi 21 mars 2014 une pétition de 34 000 signataires, personnalités et élus politiques, pour demander au Ministère de l'Éducation Nationale l'inscription au bac de l'espéranto au même titre que les 60 langues optionnelles existantes.

Le parrain de cette pétition était le regretté **Albert Jacquard**.

Entre temps d'autres fameux signataires comme **Georges Moustaki** ou **Marc Blondel (F.O.)**... ont également eu la malencontreuse idée de tirer leur révérence.....



HEROUVILLE Saint CLAIR

La 4an de februaro, klubano nia, **Henri Rousseau** prelegis pri siaj

« **REMEMORAĴOJ PRI ESPERANTO EN MADAGASKARO. 1958-1963** ».

Li kaptis la atenton de la kursanoj per belaj lum-bildoj kaj tre precizaj informoj pri historio nun grandparte forgesita. Kiel li asertas en sia tiutema broŝureto*, « Verŝajne mi estas nun la nura persono kiu povas rakonti la Historion de la esperantista movado en Madagaskaro de 1958 ĝis 1963. Mi estas 84 jaraĝa, kaj ĉu, ĉar mi ludis ioman rolon en la afero, mi devus silenti kaj forporti kun mi miajn rememorojn? Ili povos interesi eventualajn esperantistojn, nunajn aŭ estontajn, madagaskarajn aŭ alilokajn, sed ankaŭ ili ebligas ke aliaj personoj krom mi, kiuj ankaŭ ludis rolon, ne komplete malaperu en la definitiva silento de la pasinteco ».

En 1958, post plurjara laborado en Maroko kie li ankaŭ instruis esperanton, Henri, tiam 30 jaraĝa, ricevis inĝenieran postenon en Madagaskaro en la servo pri aerodromaj instalaĵoj. Li tuj kontaktis la lokajn esperantistojn kaj kun ili starigis plensukcesajn kursojn kiuj interesis plurcentojn da lernantoj. Multaj homoj entuziasmiĝis kaj trapasis ekzamenojn. En Tananarivo, en 1962, oni donis la nomon « Zamenhof » al strato. Vigle partoprenis la aferon ministro, instruistoj, studentoj kaj kamparanoj. Sed tiu nova movado rapide travivis ankaŭ malfacilaĵojn.

De 1974, Henri loĝas apud Caen kie li gvidis kursojn, partoprenis multajn aranĝojn kaj regule partoprenas la vivon de Hérouville Espéranto.

*Rememoraĵoj pri esperanto en Madagaskaro. (1958-1963) . 2012.

Verkis kaj eldonis Henri Rousseau.

Yves NICOLAS

Foto 1 : la estraro de EAM en 1962 (de maldekstre) :

Maurice Bourgeois, Gervais Randrianasolo, Frédéric Rasoanaivo, Probe Razanabaoaka, Roger Randrianekena, Henri Rousseau.



ESPERANTO EN MADAGASKARO. 1958-1963

Foto 2 : Pikniko, 1962. Dekstre, sinjorino Rousseau.



Blogo de membroj de esperanta asocio
de Hérouville-Saint-Clair

<http://herouvilleesperanto.blogspot.fr>

Prelegvojaĝas kuba esperantisto.



De la 1a de aprilo ĝis la fino de junio,

Miguel Angel Gonzalez Alfonso turneos en Francio dank'al invito de Esperanto France. Li vizitos 16 klubojn kaj ankaŭ la internacian kongreson de la fervojistoj (IFEFF) en Italio kaj amikon en Germanio. Vasta itinero por certe tre interesaj prelegoj pri Kubo kaj la tiea esperanto movado.

Li restados en **Le Havre (76)** de la 22a ĝis la 26a de aprilo kaj en **Caen (14)** de la 7a ĝis la 12a de majo. Bonvolu kontakti tiujn klubojn se vi volas ĉeesti publikan kunvenon aŭ alian aranĝon.



ie, en Taĝikio ...

Nia vivo en Flers :

Kursoj en Flers (61) :

Marde je la 13h30 : komencantoj
(Rekta Metodo, *Stano Marĉek*).

Marde je la 14h30 ĝis 16h15 :
praktikantoj (Nova Racia Kurso
+ Amuzaj Dialogoj)

kun **Anne Marie LEPREVOST**.

ASTI (Asocio de Solidareco kun enmi-
grantaj laboristoj) 2 rue Pierre Lemièr
61100 FLERS

**Réseau d'Echanges Réciproques
de Savoirs.**

Nia vivo en Granville :

Kursoj en Granville (50) : **Ĵaŭde** de la
10h00 ĝis la 12h00:

- komencantoj (Gerda malaperis)
- praktikantoj (Paŝoj al plena posedo)

Universitato Interaĝoj de Granville.

Christian Levesque.

Nia vivo en Coutances :

Kursoj en Coutances (50) :

Monata babilrondo (**Unelles**)

Ĉiulasta Ĵaŭdo de la 18h00 ĝis la
20h00:

- libro : « La Templo de l'suno,
Aventuro de Tinĉjo »

Christian LEVESQUE

Esperanto - Hérouville

1984 - 2014

En 2014 nia asocio Hérouville-Esperanto festos sian 30an datrevenon. Okaze de tiu jubileo, ni jam planis kelkajn aferojn:

- staĝon por komencantoj kaj progresantoj la **18an kaj 19an de oktobro 2014**; gvidos la kursojn du instruistoj:

Michel Dechy el Lille.

Stano Marček el Slovakio.

- internacian biciklan semajnon de la **25a ĝis la 29a de aŭgusto 2014**.

- plurajn prelegojn fare de eksterlandanoj dum la tuta jaro.

- ekspoziciojn pri la lingvo.

Kaj, se kiel promesite, nia propono estas aprobita de la heruvila urbestro ... ni inaŭguros « Placon de Esperanto » en iu kvartalo de Hérouville la **20an de septembro 2014, kun la Ĝenerala Kunveno de Esperanto-Normandie**. Ni esperu !

Pli da informoj pri ĉio vi havos iom post iom legante vian Normandan Bultenon.

Gérard Sénécal : 06 89 74 26 65

gigesenecal@gmail.com

Yves Nicolas : 06 44 87 22 48

ivnicolas@sfr.fr



STAGE D'INITIATION et de PERFECTIONNEMENT à l'ESPÉRANTO

HÉROUVILLE-SAINT-CLAIR
18 et 19 OCTOBRE 2014

Le stage sera animé par deux enseignants chevronnés, le Slovaque **Stano Marček** et le Français **Michel Dechy**.

Stano Marček est président de la Fédération Slovaque d'Espéranto et membre de l'Académie d'Espéranto. Rédacteur des revues "*Juna Amiko*" et "*Esperanto Aktuell*" il a été le rédacteur en chef de la revue *ESPERANTO* de 2012 à fin 2013.

Outre ses nombreux ouvrages en Espéranto et en Slovaque, Stano est l'auteur d'une fameuse méthode d'apprentissage qui a déjà été traduite dans 34 langues, "*L'espéranto par la méthode directe*".

Pendant le stage, Stano prendra en charge les vrais débutants et les débutants ayant besoin de renforcer leurs acquis. Musicien, il se propose également de faire chanter tout le monde en projetant le texte des chants et en s'accompagnant à la guitare.

Michel Dechy enseigne l'Espéranto depuis plus de quinze ans, aussi bien à des enfants qu'à des jeunes, des étudiants ou des retraités dans des écoles, des collèges, des lycées ou des associations. Il intervient régulièrement dans des événements organisés au château de Grésillon, à Kvinpetalo ou pendant les rencontres de Plouezec.

Michel Dechy enseigne l'Espéranto en utilisant les bandes dessinées de Tintin. Son objectif est d'améliorer l'expression orale des stagiaires et d'approfondir leur connaissance de la langue. Il a été responsable de l'édition en Espéranto de deux albums de Tintin : "*Tintin au Tibet*" et "*Le temple du Soleil*".

Par ailleurs il est l'auteur d'une méthode d'apprentissage parue en 2010, "*Les BD, manuels d'apprentissage*".

La fiche d'inscription pour le stage sera disponible dans le prochain numéro du Bulletin Normand qui paraîtra en juin 2014.

En **Granville** (50) - salono Herel - en la Universitato « Inter-aĝoj » .

la 2an de decembro 2013 je la 15a horo,
Zef JEGARD, nia esperantista biciklanto
komentis, per ekspozicio + bildoj,
sian biciklan vojaĝon : (9.000 kilometroj)
(Brest - Vladivostoko),
+ aliajn longdistancajn bicikladojn
kiujn li faris « malgraŭ » la fakto ke li tiam estis
65 jaraĝa !

Dum tiu vojaĝo li plejofte gastis ĉe la loĝantaro
kaj li fakte estis ambasadoro de Esperanto.

Li mirigis la prelegan ĉeestantaron
pro kuraĝo kaj volo dum tiuj nekutimaj vojaĝoj.
Antaŭ kaj post tiu prelego, okazis en tiu salono,
ekspozicio pri Esperanto dank'al nia amiko
Christian Levesque.



*Armor-Esperanto, en Dinano, organizas esperantan
aranĝon kaj jam bonvenigas vin en la venonta SAT
kongreso 2014:*



- antaŭkongreso la 7-8an/08/2014 (dutagaj ekskursoj en belega turisma regiono).
- kongreso en Dinano la 9-16an/08/2014.
- postkongreso : internacia semajno en Pluezeko.

Eblas elŝuti aŭ rekte/rete plenigi aliĝilon alklakante la ĉi-suban ligon al la kongresretejo:

<http://www.satesperanto.org/-2014-87a-Dinano-.html>

Jen ankaŭ retadreso de la kongreso :
satdinan2014@gmail.com

Ne hezitu restadi en belega regiono dum tri some-
raj semajnoj sen sekve, kie multaj esperantistoj
pretiĝos gastigi vin en esperanta etoso.

Stella Plage 2013

Sabate la **16an de novembro** 2013 mi ve-
turis el mia domo en Vattetot sous Beaumont
apud Yvetot kaj alvenis en **Stella Plage** por
tagmanĝi je la 13a. La manĝaĵoj estis ĉiam
tre bele prezentitaj. Ni estis lokitaj ĉe rondaj
tabloj po 8 personoj, kaj mi identigis jam ren-
kontiĝintajn ulojn de la antaŭaj jaroj.

Poste ni elektis la derizintajn aktivaĵojn : ĉu
babili pri la B.D. Tinĉjo kun **Michel Dechy** aŭ
literaturo kun **Anne Jausions**. Ankaŭ oni
povis plulerni lingvon kun **Katalin Kováts**
kaj kantadi kun **Franjo Lévêque**.

Mi elektis la literaturan staĝon. Ni unue parol-
is pri ĝenerala skizo de la E^o literaturo. Oni
rakontis pri la libroj kiujn ni jam legis, poste
la animantino disdonis fotokopiojn pri elтираĵoj
de libroj kaj ĉiu siavice legis paragrafon.

Dum la paŭzoj ni iris en la kunvenan salonojn
kie belga paro proponis kaj vendis sufiĉe
grandan kolekton da libroj. Mi aĉetis kelkajn
por legi dum vintraj vesperoj. Ni ankaŭ povis
viziti ekspozicion de pentraĵoj. **Katalin Kováts**
montris belan kolekton de emajloj.

Denove ni reiris klasĉambren por studi litera-
turaĵojn. Post vespermanĝo ni ĉeestis pre-
zentadon de kanzonisto Guillaume Armide,
kiu bele kantis esperantlingve. Por la nokto ni
estis du po ĉambro, kaj mi retrovis la saman
kunulon kiel pasintjare. Ni bone interbabilis,
sed ne tro longe, ĉar la sekvanta leviĝo estis
frue programita.

Dimanĉe la matenmanĝo okazis je la 7a kaj ni
reiris klasĉambren por literaturumi denove.
Poste mi elektis promenadon marborden. Tiu
promenado estis gvidata de Sro **Edmond Plutniak**.
Tion ni faris rapide, ĉar marrando
situis 2 kilometrojn fore, kaj malmultan li-
beran tempon havis ni. Posttagmanĝe okazis
ĝenerala fotado de la grupo.

Sekvis babilado, **Katalin Kováts** disdonis
la "KER » diplomojn post la ekzamenoj. La
kantada ateliero gvidata de **Franjo Lévêque**
koncertis kaj iom antaŭ la 17a h. finiĝis tiu
staĝo.

Gesinjoroj **Plutniak** organizis tiun ĉiujaran
agrablegan kunvenon kun Sro **Vilain** kiel kas-
isto.

Gratulojn al ĉiuj organizintoj kaj al la anim-
intoj de la staĝeroj.

Laŭ raporto de : **Alain CHALM**

Kotizo por 2014

Faru vian ĉekon profite de:

ESPERANTO-NORMANDIE CCP 283 40 H ROUEN

Abon-kotizo por 2014 : 8 Eŭroj,

kaj sendu ĝin al la kasisto :

Pierre Lemarchand,

2 Résidence Les Terres Quemines

76113 Hautot-sur-Seine.

Financa raporto je la 31a de decembro 2013

ENSPEZOJ (Eŭroj)		ELSPEZOJ (Eŭroj)	
Ĉe CCP, la 31a de decembro 2012 :	2 363,72 €		
Kotizoj + Donacoj : De la 01/01/2013 ĝis la 31/12/2013 :	662,00 €	Bulteno : Sendado : leterkovertoj + poŝtmarkoj : Fotokopioj :	391,15
Informado : St Pierre de Varengeville + libroj	139,03 €		281,15 110,00
		Poŝtbanka administracio : Kasibiro : St Pierre Varengeville + libroj : Subvencio staĝo Hérouville nov. 2012 S. Smetanina : Ĝenerala Kunveno Bricquebec : Bricquebec : 2 japanoj :	18,80 21,76 139,03 150,00 25,27 106,00
Sumaj ENSPEZOJ :	801,03 €	Sumaj ELSPEZOJ :	852,01 €
		Ĉe CCP, la 31a de decembro 2013	2 312,74 €
Bilanco	3 164,75 €	Bilanco	3 164,75 €

Anekdoto de malnova Grekio.

LA TRI HAKILOJ

Antaŭ 25 jarcentoj, en Atika vilaĝo, vivis tre malriĉa arbohakisto kies nura havaĵo krom lia simpla kabano kaj ĝia enhavo, estis lia nepre necesa laborilo, bonega ŝtala hakilo. Iam dum li dormis dorsapogita ĉe arbo post elĉerpiga laboro, oni ŝtelis lian apudmetitan hakilon.

Kiam li vekiĝis li kun hororo konstatis la malaperon de la vivrimedo de sia familio, kaj komencis longe kaj bruege lamenti al la ĉielo :

« Oh ĉiopova Zeŭso, oni ŝtelis mian hakilon, mi ne plu povos labori kaj gajni la panon de miaj geinfanoj ; ili estas mortontaj pro malsato ; tia hakilo kostas fortunon kiun mi ne posedas, faru ion ... » Kaj li tion ripetadis senhalte, tiel ke sur la monto Olimpo kie troviĝis la restadejo de la Dioj, oni aŭdis nur liajn plendojn kaj ne plu estis eble diskuti inter si. Tio rapide incitis Zeŭson, kiu vokis sian mesaĝiston Hermeson, al kiu li diris :

« Tio ne povas daŭri, iru sur la teron kaj trovu la solvon kiun ci volas, sed mi ne plu volas aŭdi la kriaĉojn de tiu mizerulo ! »

Hermeso do, vestite laŭ homa kampara maniero, iris al la arbaro de nia arbohakisto, kaj lin diris :

- Oh viro, kio okazas, kial ci tiel lamentas kaj tedas la diojn per ciaz kriaĉoj ?

- Oni ŝtelis mian hakilon kaj mi ne plu povos gajni la panon de miaj kompatindaj infanoj, ili estas mortontaj pro malsato, oh Zeŭso ion faru por...

Sed Hermeso kiu volis protekti la pacon de sia mastro, lin tuj silentigis. Kaj ĉar li ankaŭ volis iom amuziĝi kaj provi la honestecon de la viro, li diris :

- Ĉu cia hakilo ne estus tiu, kiun mi vidas tie, malantaŭ ci ? Kaj li montris eksterordinaran hakilon el oro, inkrustitan per sennombraj diamantoj.

- Oh, kiel bela ĝi estas ! Diris la hakisto. Kiom altvalora ĝi certe estas ! Se ĝi estus mia mi ne laborus per ĝi, sed ĝin vendus por komforte vivi. Sed bedaŭrinde ĝi ne estas mia. Oh granda Zeŭso ! Redonu min mian fortikan hakilon por ke miaj kompatindaj geinfanetoj ne ...

- Haltu ! Kriis Hermeso. Kaj tiu alia hakilo ne estus la cia ? Kaj apud proksima arbo, troviĝis belega elarĝenta hakilo inkrustita per smeraldoj, rubenoj kaj bluaj beriloj.

- Ankaŭ tiu estas belega kaj altvalorega, diris la malfeliĉulo, sed bedaŭrinde ne temas pri la mia, tiu ne estus sufiĉe fortika por tranĉi lignon, oh Zeŭso, redonu min mian ŝtalan hakilon por ke mi plu povu gajni la panon de miaj ...

- Haltu ! Denove rapide kriis Hermeso. Ci estas honesta homo, jen cia ŝtala kaj ligna hakilo. Kaj por rekompenci cian honestecon, Zeŭso cin donacas ankaŭ la du aliajn hakilojn.

Tiel la arbohakisto fariĝis riĉega. Li vendis la du altvalorajn hakilojn kaj konstruigis komfortan domon por sia familio, kaj ĝin konvene meblizis. Li konstante laŭdis la Diojn de la Olimpo, kaj ĉiam estis oferema rilate la malfeliĉuloj.

Henri ROUSSEAU